MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 5

MAJO 2020 Kol. 421/36

xxxx

UEA esperas, ke ĉiuj bone fartas. La sano de la kongresanoj kaj de ĉiuj homoj estas por ni la plej alta prioritato. Post zorga konsiderado de ĉiuj aspektoj de la koronvirusa tutmonda epidemio kaj ĝiaj sekvoj, la Estraro de UEA, la Centra Oficejo, LKK kaj la kongresejo en Montrealo venis al la konkludo, ke tute ne estus sekure kaj prudente okazigi la UK-on en Montrealo en 2020. Cetere, laŭ la novaj pli striktaj reguloj de la kebekia registaro, je nia granda bedaŭro en 2020 ne eblos okazigi Universalan Kongreson de Esperanto.

Pro tio la Estraro de UEA unuanime decidis prokrasti la Universalan Kongreson en Montrealo al la jaro 2022.

Jan Karafiát

La 31-an de marto 2020 pasis 91 jarojn ekde la morto de tiu ĉi elstara verkisto de infana literaturo. Li naskiĝis 4.1.1846 en Jimramov, frekventis la gimnazion en Litomyšl, poste studis teologion en Berlino, Bonn kaj Vieno. Kiel evangelia pastro li ekde la jaro 1873 postenis en diversaj lokoj de Ĉeĥio.

En la jaro 1876 li je sia propra preselspezo anonime eldonigis libron por infanoj Broučci (**Lampiroj**). Dek sep jarojn la libro estis preskaŭ nekonata. Nur post favora recenzo subite ĝi estis disvendita kaj post la jaro 1894 ĝi estis denove kaj denove, kun diversaj ilustraĵoj, eldonata, ĝis la deka eldono, ĉiam anonime. Nur tiam la senpretendema aŭtoro publike konfesis sian propran verkon. En la ĉeĥa lingvo la libro estis eldonita preskaŭ centfoje. Ĝi iĝis certe la plej ofte legata libro ne nur por infanoj. Eĉ ni, “pli frue naskiĝintaj,“ rememoras okazintaĵojn de la

malobeema Lampireto, de liaj gepatroj, de Janinka, kaj la mision de Lampiroj – prilumadi la vojojn al homoj kaj aliaj animaloj.



La aŭtoron, pastron, fascinis la flugetado de brilantaj lumetoj tra la nokta mallumo. La „Sanktjohana lampiro“ en nia naturo aperas de junio ĝis aŭgusto. Lumi kapablas nur ties maskleto.

La ĉeĥa verkisto Jan Skácel diris pri Jan Karafiát: „Li kiel unusola scipovis al infanoj diri, ke en la mondo ekzistas morto, ke ekzistas diverseco kaj regula ripetado de jarsezonoj, ke tago kaj nokto alternas, ke la morto estas ununura afero de la mondo, al kiu ni devas esti obeaj. Li estis delikata, ne aldonis, ke nenio alia por ni restas.“ Tradukis Pavel Nechvíle

Tradicia fabrikado de horizontalaj kaj vertikalaj pianoj
Historio de la familio Petrof

La 10-an de marto 2020 mi partoprenis kun nia grupo vojaĝon al Hradec Králové. Tie ni vizitis grandan fabrikon de pianoj kaj de ceteraj muzik-instrumentoj. La ekspozicio estis tre interesa kaj granda, tamen por miaj doloraj kruroj tre laciga. Sed mi skribos al vi almenaŭ ion pri la familio Petrof, posedantoj de la fabriko. M. Kosnarová

Antonín Petrof

La praavo de Inĝ. Jan, Antonín Petrof, la dua el naŭ infanoj de la lignaĵisto Jan Petrof, lernis por esti lignaĵisto en la eta korta laborejo de la domo post la katedralo de la

Sankta Spirito. La frato de lia patrino produktis en Vieno novaĵon, ludantan artaĵon - belan meblo-fortepianon, kiu fariĝis moda evento.
Antonín restis ĉe sia onklo en Vieno sep jarojn, poste li lernis ĉe pluaj produktistoj de pianoj. En la jaro 1864 li revenis al Hradec Králové kaj kiel slavo kaj patrioto gvidis sin per la penso: „mi konstruos ĉeĥajn pianojn por la monarĥio kaj ili devas havi molan slavan romantikan tonon, ne la malmolan draŝan tonon (břinkavý tón) de la germanaj produktantoj“.

La unua piano estis preta en la jaro 1864 kaj sukcese estis vendita al iu burĝa familio. La fondinto Antonín mortis en la jaro 1915 kaj la juna heredinto, la plej juna filo Vladimír, devis solvi sian, eĉ gepatran negocon kaj zorgojn koncernajn la patrinon kaj gefratojn. Tamen dum la tempo ĉio sukcese solviĝis kaj Vladimír, kun du siaj laboristoj, produktis pluajn pianojn, kiujn oni postuladis.

Antonín edziĝis kun sia fianĉino, ŝi alportis al la entrepreno sian doton kaj komencis esti prokuristino de la firmao. Kune ili aĉetis taŭgajn parcelojn por la domo kaj manufakturo, por la familio, kiun poste kreis ankaŭ tri filoj kaj tri filinoj.
En tiu tempo estis granda intereso pri pianoj. Antonín sub premo de mendoj komencas produkti pluan modernan muzik-aparaton

= harmoniumon. La praavo bone zorgas pri la bona famo de siaj produktoj kaj de la familio, kaj ĉiuj tri filoj tion postsekvis, ili ellernis en la fabriko ĉe la patro kaj poste ili iris kolekti spertojn ĉe aliaj eŭropaj fabrikistoj de pianoj. Tion oni tiam normale praktikis kaj per tio estis fiksitaj interkonkurencaj amikecaj rilatoj.

En la jaroj 1890 – 1900 nia imperiestro, la ĉeĥa reĝo František Josef la Unua ofte vizitadis diversajn ekspoziciojn, same ankaŭ tiun de nia Petrof. Antaŭ la fino de unu ekspozicio venis la deĵora fak-oficisto, ke La moŝto- imperiestro konsentas doni al A. Petrof la titolon „korta fabrikisto de pianoj kaj imperiestra sekreta konsilanto.“ Sed daŭris pluajn 8 jarojn, ĝis li ricevis la titolon, post pago de unu mil orajn monerojn.

Továrna PETROF v Hradci Králové

Antonín Petrof plimultigas fabrikadon de vertikalaj pianoj, (kiuj jam en malgrandaj loĝejoj ne prenas tiom da loko), li modernigis la laboron. Dum la 1-a mondmilito estis la laboro limigita, sed post la milito la tri fratoj, kunposedantoj, denove kunlaboris kaj produktis horizontalan kaj vertikalaj pianojn, harmoniumojn, pligrandigis la negocon ne nur en Eŭropo, sed al Sud-Ameriko, Sud-Afriko, Japanio kaj Aŭstralio.

En la fabriko laboris preskaŭ 350 homoj, ili vendis kaj produktis jare ĝis 2800 instrumentoj. La fabriko estis tute memstara, ĝi inventas novajn modelojn de fortepianoj, pianetoj kaj harmoniumoj.

Kaj venas konjunkturo, ĝis pluaj militaj jaroj 1939 – 1945, kiam la plimulto de la laborantoj estis sendita en Germanion por

devigaj labor-okupoj. Pianojn, en negranda kvanto, oni vendadas plu. Antaŭ la milito estis interkonsentite en la juna generacio de Petrof, ke ĉiu el la tri kunposedantoj sendos unu filon, kiu ellernos konstrui pianojn, ke post finlerno en komerc-akademio tiu iris en la mondon en lingvajn lernejojn kaj en reciprokan meti-instruadon ĉe estontaj kun-posedantoj.

Post la fino de la milito, en 1945, denove kreskas la produktado kaj negoco. Sed subite – ĉio estis alia! Venis komunisma reĝimo, en februaro 1948. La maljunaj kunposedantoj kaj la juna generacio estis elpelitaj el la fabriko, deprenitaj estis iliaj rajtoj kaj havaĵo kaj kiel klas-malamikoj ili estas malliberigitaj. Eĉ iliaj infanoj ne povis studi, povis nur lerni ian metion.

Post la jaro 1989 okazis senŝtatigado (do re-privatigado).
Fine la juna generacio povis instruiĝi kio estas piano, la manieron komuniki kun homoj, lerni lingvojn kaj negocon kaj entute scii ĉion, kio estas bezonata por entreprenado de internacia firmao; kaj ankaŭ persone ekkoni ĉeĥajn kaj internaciajn pianistojn.

El la broŝuro pri la familio Petrof tradukis Jarmila Rýznarová

Informo de la blindulsekcio ĉe ĈEA

Karaj kaj estimataj samideanoj!
Fine de la pasinta jaro mi ofertis al vi kelkajn voĉlegitajn literaturaĵojn en Esperanto, kiujn vi povas elŝuti.

Nun estas nove je via dispono plua voĉlegita verko "Kun blanka bastono", verkita de en nia medio tre fama kaj konata ĉeĥa **blinda esperantisto Rudolf Krchňák**.
Je la fino de la pasinta jaro kaj komence de ĉi tiu

jaro la kolekton de 18 skizoj kaj enkodukon voĉlegis s-anoj Vladimír Türk kaj Jaroslava Malá.
Ankaŭ en ĉi tiu formo mi tre dankas al ambaŭ por ties afabla kaj peniga faro. Je la fino de la registraĵo estas envicigita la biografio de Krchňák, voĉlegita de s-ino Ivana Karašova, kiu kun sia edzo dum multaj jaroj voĉlegadas la ĉeĥan e-brajlan gazeton Aŭroro.

Jen estas la ligilo: https://1drv.ms/u/s!AgztvmJnEASAo2fKZw-kUQ50eMxh?e=FJaEjCnino
Mi deziras al vi agrablan aŭskultadon! Jan Příborský

D-ro Oldřich Hrubeš

La 19-an de marto forpasis ano de AEH, eksmembro de la E-klubo en Pardubice, kiu multajn jarojn vivis en Danujo, samideano D-ro Oldřich Hrubeš, en sia 94-jaraĝo. Sed lia veno al Danujo ne estis sen interesaĵoj. Mi konis lin kiel mian E-instruiston, ĉiam plenan de spriteco kaj bonhumoro.
Koncerne lian elmigron en Danujon:
En la jaro 1962 s-ano Hrubeš dum la internacia ekspozicio en Leipzig, renkontis nederlandanojn kaj danojn. Sed post kelkaj jaroj tiu ĉi renkonto montriĝis tre danĝera por lia vivo. En 1965 venis en lian hejmon sekreta policano, kiu demandis, kion la okcidentaj esperantistoj antaŭ 3 jaroj volis de li, ke li ĉion diru, sed plenvere, alie li malbone fartos. Ĉe tio li minacis kaj kriis, ke li scias, ke Hrubeš estas spiono.

Post unu jaro lia situacio ankoraŭ pli malboniĝis, ĉar en tiu streĉa tempo vizitis lin esperantistoj el Danujo. Hrubeš devis multfoje viziti policejon por senĉese ripetadi respondojn je ties demandoj, kaj pro tio liaj nervoj estis jam ege streĉitaj. Li jam pricerbumis, kiel fini sian propran vivon.

Subite venis al li feliĉa ideo, ke estus pli bone forlasi sian patrujon. Trajne li vojaĝis kun eta agentejo al Italio, sed survoje helpe de unu esperantisto li elvagoniĝis en Vieno kaj per la helpo de la Viena E-klubo atingis Danujon. Tie li baldaŭ ricevis politikan azilon.
En Danujo li komencis vivi denove pere de helpo de Esperanto. Post la liberiĝo de nia patrujo li ofte vizitadis parencojn kaj amikojn, ankaŭ aranĝojn de AEH. J. Rýznarová

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová, Lenka Angelová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ **10 €** (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.